

## La venĝo de la recenzantoj aŭ la progreso de l'ciniko

Postrepliko de kritikita libro-aŭtoro

Estas konate, ke la Esperanto-movado ambivalente rilatis al la judeco de L.L. Zamenhof kaj al ties jude influitaj homaranismaj ideoj. La spektro de la sinteno pri tiuj aferoj etendiĝis de simpatia akceptemo tra indiferenteco ĝis ekstremaj kritiko kaj rifuzo (kiel en la kazo antaŭ ĉio en certaj maldekstraj medioj sur la linio Drezen-Graetz-Blanke). Nu, Zamenhof mem konsilis al siaj kunbatalantoj, ke oni ne emfazu lian judecon, ĉar tio povus malhelpi la Esperanto-propagandon. Tial, kaj ne nur en Pollando (kiu, cetere, dum la vivotempo de Zamenhof ne ekzistis kiel ŝtato) oni provis fari *el la judo Zamenhof kvazaŭ maljudon*, proklamante lin „polo”; sed ĉi polan identecon Zamenhof mem kontestis kaj eĉ strikte rifuzis. Li nomis sin „ruslanda hebreo”, kiel sian historian patrujon li konsideris „Litovujo”, ĉar lia familio apartenis al la branĉo de la litovaj judoj (litvakoj). Sed tiun ĉi komplikan gentan identecon de Zamenhof la esperantistoj unue neniam kapablis kompreni, due oni simple ignoris ĝin, ĉar ĝi ne konvenis al la propagando favore al la „pola” okulisto k.s. Ke li vivis kaj laboris sur pola tero ja estis memkompreneble. Eblas do konkludi, ke la judeco de Zamenhof evidente signifis certan problemon aŭ embarason por la Esperanto-movado kaj ne aparte interesis ĝin, precipe certajn maldekstrajn (= kontraŭcionismajn?) mediojn en UEA, kun ĉiuj sekvoj, kiujn tiu sinteno havis. Tio estis tiel antaŭ 1917, kaj en la intermilita periodo, kaj post la dua mondmilito, nome en oriento kaj en okcidento. Ankaŭ post 1989 oni malemis skribi pri la judeco de Zamenhof en oficialaj dokumentoj, kaj en la kongresa rezolucio de Bjalistoko de la jubilea Zamenhof-jaro 2009 adekvata honorigo de la judeco de Zamenhof ne okazis. Kvazaŭ la judeco de Zamenhof tute ne koncernus la Esperanto-movadon. Siatempe mi kritikis tion, ĉar mi opiniis, ke tian honorigon de sia judeco Zamenhof certe meritus, despli ke li ĉiam sincere konfesis sian veran identecon. Oni povas diri, ke sen la judeco de Zamenhof Esperanto verŝajne eĉ ne ekzistus, sed tia aserto estas en la Esperanto-movado tute malpopulara.

Do, la celo de mia laboro kaj de la libro mem estas renversi la ĝisnunajn tordojn, duonverojn kaj mensogojn kaj restarigi la veron pri L.L. Zamenhof. Sed ĉar la mitoj, legendoj kaj konvinkoj pri Zamenhof, kiujn la Esperanto-propagandistoj produktis, ŝajne jam tiom forte enradikiĝis en la Esperanto-movado dum 125 jaroj, mi timas, ke ĉia provo revizii la historion jam estas vana klopodo, se ne kondamnita por fiaski.

Kelkaj rimarkoj, precizigoj kaj ĝustigoj pri la libro

Ĉu plaĉas aŭ ne, mi pretendas esti verkinta la unuan sciencan Zamenhof-biografion en germana lingvo – kaj verŝajne ankaŭ entute –, kiu enfokusigas la judan kuntekston de Zamenhof. Sed kelkaj recenzantoj ŝajne ne volas agnoski tiun fakton kaj komencis skeptike rigardi kaj disŝiri mian verkon, ekzemple en la revuo *Esperanto* (UEA) kaj en *Language Problems and Language Planning* (LPLP). Por eviti falsan impreson aperintan pro la unuflanka kritiko, mi sentas min devigita iom pravigi miajn vidpunktojn kaj ĝustigi kelkajn eventualajn miskomprenojn. La plumpa agresemo de iuj – ĉefe germandevenaj – recenzantoj kontraŭ mia Zamenhof-biografio en si mem estas nenio nova kaj povas havi diversajn radikojn kaj motivojn: Neracia malamo kontraŭ Zamenhof, ideologiaj-politikaj-religiaj konsideroj, antisemitismaj refleksoj (aŭ almenaŭ alergia kontraŭ aŭ malŝato de judaj aferoj<sup>1</sup>), simpla aroganteco, persona frustrigo, neta envio aŭ venĝemo kontraŭ la aŭtoro pro personaj kialoj, aŭ io alia car ste tiuj kritikantoj neniam favor rilatas al la judeco de Zamenhof. La ĉefa problemo estas, ke tiuj “historiistoj” celas konservi kaj varti sian nedifekteblan monopolon pri la “ĝusta” kaj “vera” interpretado de Zamenhof.

La enkondukaj ĉapitroj kaj la ‘ekskursoj’ pri la historio de Ruslando, Pollando, antisemitismo ktp. estis aldonitaj, por ke foje ankaŭ la esperantistoj, kiuj legos la libron, povu konatiĝi kun tiuj temoj por percepti Zamenhofon en la historia-politika kaj juda kunteksto. La celo de tiuj ĉapitroj do estis montri pere de la specifeco de la historio kaj kulturo de la poloj, rusoj kaj judoj, kial Zamenhof ne povis esti nomita polo (aŭ ruso), sed kial li povis esti nur judo kaj kial li povas kaj devas esti perceptita nur kiel judo.

---

<sup>1</sup> Kiel tio ekzistas antaŭ ĉio en certaj katolikaj, luterismaj, ateismaj kaj Israel-kritikaj medioj.

En mia libro estas detale prezentitaj unufoje ankaŭ la ĝenerale malpli konataj epizodoj kun Sokolov, Dambrauskas, Ostwald k.m.a., kaj aldonita la artikolo de Josef Meisl, kion la recenzantoj ne honoris. La plej esenca korespondaĵo inter Zamenhof kaj la esperantistoj estas en la libro ĉerpita el Plena Verkaro (PVZ) ĉe ludovikito, ĉiuj fontoj kaj citaĵoj estas indikitaj en la teksto. Ĉe la 'daŭrigo' (ĉap. 34) la celo ne estis detale raporti pri Olsvanger, sed memori la murditajn Zamenhof-familianojn dum la holokaŭsto. En mia libro estas menciitaj sufiĉe da judaj agantoj, kiuj esence kontribuis al la komenco de la Esperanto-movado en Ruslando kaj Eŭropo. Eĉ unu vorton pri tiuj protagonistoj la recenzantoj ne perdis! Krom tio, la situacio en Bjalistoko estas detale priskribita, ankaŭ la etoso en la Zamenhofa familio karakterizita laŭ la disponeblaj atestoj de samtempoj. Ktp. ktp. Estis farita la provo poziciigi la Zamenhofan hilelismen en la kuntekston de la tiama cionisma debato. Kial mi devus konsulti la anglan-usonon literaturon pri judismo kaj cionismo? La germanlingva sufiĉas kaj taŭgas, kaj ĝin mi konsideris en sufiĉa amplekso. La libro ankaŭ ne celis enprofundiĝi en judistikajn faktemarojn (ĉe iuj judistoj la librotitolo do eble vekis troajn atendojn). La pozicio de Zamenhof pri la cionismo estas ĝenerale konata kaj ankoraŭfoje objektivite prilaborita en la libro. Nun ĝi ne plu povas esti evitata, prisilentata, manipulata, primokata aŭ eĉ falsata, kiel tio okazis en la pasinteco. Diference de aliaj recenzantoj, Lins, kopiinte grandparte la argumentojn de Hauptenthal, tamen almenaŭ rimarkis, ke la hilelisma teksto de L.L. Zamenhof de 1901 ekzistas nun ankaŭ en germana traduko (eĉ se ne plej perfekta kaj eble reviziota). La bibliografio estas la ĝis nun plej ampleksa aperinta en iu ajn libro pri Zamenhof, kaj ĝi respegulas la ekspluaton de multaj ĝis nun nekonsideritaj artikoloj. Ke Lins kaj aliaj emfazas naŭzon kaj tedon pri aŭ pro bagateloj, signifas, ke ilia argumentado elĉerpiĝis. La centra hipotezo de mia libro, ke la kreado kaj publikigo de Esperanto estas esence, senpere kaj rekte ligita kun la juda demando ĉe Zamenhof en la Ruslanda Imperio, restas nekomentita de la recenzantoj, kiuj sendube bone konscias pri tiu ĉi fakto. La problemo estas, ke ili ne volas konfesi kaj agnoski ĝin!

Eĉ unusolan pozitivan punkton Lins ne povis trovi en mia libro, dum aliaj legantoj kaj recenzantoj kiel ekzemple Tazio Carlevaro, Liu Haitao, Tomasz Chmielik, Walter Ŝelazny, Leif Nordenstorm, Fritz Wollenberg kaj aliaj, pritaksis la libron multe pli pozitive aŭ almenaŭ pli neŭtrale. Agnieszka Jagodzińska de la universitato Wrocław (PL) verkis por *AJS Review* (Cambridge) normalan recenzon, kiu distingiĝas per sia pli alta objektiveco disde la strangaj esperantistaj reagoj. En *Religious Studies Review* Shaul Stampfer de la Hebrea Universitato bonvenigis la libron kiel "tre impresan studon", "sendube gravan". (Kaj en 2017 la libro estis tre laŭdita de Liliana Ruth Feierstein, profesorino pri kulturaj sciencoj en Berlino).

La eldonisto de Harrassowitz trovis mian manuskripton interesa kaj bonvenigis la libron en la koncerna juda serio. Cetere, ĉe la libroeldonejoj validas jena principo: Pli bone estu detrua kritiko ol morta silento.

Mi mem konas la fortojn kaj malfortojn de mia Zamenhof-libro kaj do ne bezonas la instruon de tiuj 'fakuloj', kiuj alergias pri la temo Zamenhof kaj kiuj ankaŭ neniam emis aŭ kapablis reale kunlabori unu kun la aliaj, sed mem ĉiam sciis ĉion pli bone ol la aliaj.

Koncerne la kunlaboron: Dum la verkado de mia libro mi skribis al diversaj personoj en Germanio, inter alie al Germana Esperanto-Asocio (Fischer), Gesellschaft für Interlinguistik (Blanke) kaj ankaŭ al sinjoro Lins persone la demandon, ĉu oni estus preta apogi mian laboron (ekzemple kiel lektoro-korektanto aŭ konsilanto). En ĉiuj kazoj sekvis kruda rifuza respondo ("mi ne havas tempon" k.s.).

Entute mi mem opinias, ke mia libro prezentas sufiĉe da substanco, pri kiu oni povas okupiĝi aŭ elmordi siajn dentojn. Kompare kun la banalaj, seninteresaj kaj malesencaj diskutoj, kiuj okazis dum la Zamenhof-jubileo kaj okazas en la Esperanto-movado entute, mi kredas, ke mia libro estis la plej forta kontribuo. La bedaŭrinde tro oftaj kaj nepardoneblaj komposteraroj, kiuj ne kripligas la sencon aŭ ĝenas la komprenon de la teksto sed kiuj ege ĉagrenis ankaŭ la aŭtoron, kiam li rimarkis ilin post la apero de la libro, povos esti korektitaj en dua eldono aŭ nova eldono de la teksto (kiun prepari mi tamen havas neniun planon). La eldono bedaŭrinde ne disponigis lektoradon nek kontrolis la tekston, tiel ke tiuj ĝenaj eraroj bedaŭrinde postrestis en la kompostajo. La lektorado de ekstera kompetentulo evidentiĝus tre multekosta, pro kio oni rezignis pri ĝi. Mi mem faris la eraron, ke mi tro rapide transdonis la plurfoje de mi tralegitan tekston por la presado. Mi komplete subtaksis la eraro-diablon, kaj la erarojn mi rimarkis nur jarojn poste, kiam mi relegis la tekston. La eldonisto de la juda serio de Harrassowitz, kie aperis la biografio, akceptis la tekston por presado sen fari ajnajn kritikajn

rimarkojn. Kun tiu projekto mi iusence falis en la kaptilon de la malseriozeco, indiferenteco kaj tempomanko – kaj de la sekvaj logikaj mokado kaj totala senintereso.

Krom la aperigo de la de mi esperantigita kataloga teksteto (kiun mi mem sendis al la redaktoro), la bulteno de GEA *Esperanto aktuell*, neniam prezentis la libron, sed nur menciis ĝin en n-ro 1/11, p. 15, en la bibliografio kaj en la raporto de Utho Maier sur p. 21, laŭ kiu oni ekscias, ke la responsuloj de la Esperanto-biblioteko en Aalen evidente komencis „pripensis ĉu entute indas aŭ ne akiri tiun ĉi ne tre moderprezan verkon de Andreas Künzli“. Estas vere, ke la prezo de la libro por privataj klientoj estas tro alta. Sed feliĉe ili „ankoraŭ ĝustatempe“ ricevis ĝin ŝajne dank’ al la granda mecenato Ulrich Lins, kiu probable ricevis pruntitan aŭ senpagan recenzan ekzempleron de la eldonejo aŭ de UEA kaj pludonacis ĝin, post farita recenzo-laboro, al Aalen. Cetere, la menciita bulteno ankaŭ neniam bonvolis aperi ĉi tiun mian replikon pri la aperintaj recenzoj, kiu estis publikigita en la interreto. Krom tio, pri la libro regas totala silento en la Esperanto-medioj de Germanio, Aŭstrio kaj Svislando kaj la aŭtoro ankaŭ neniam ricevis iun ajn inviton de iu germana, svisa aŭ aŭstra Esperanto-klubo. Mi ankaŭ ne trudiĝis al tiuj kluboj. Ĉu temas nur pri indiferenteco aŭ ĉu ekzistas eventuale ankaŭ aliaj, pli seriozaj kialoj? Aŭ ĉu alvenis la longe timata fino de la Esperanto-movado, de kiu eĉ ĝiaj libroaŭtoroj nenion plu aŭdas?

Humphrey Tonkin, la eldonisto de *LPLP*, rifuzis publikigi mian replikon en sia revuo kun jena klarigo: “LPLP ne havas apartan rubrikon en kiu aŭtoroj de libroj recenzitaj en la revuo havas lokon por respondi. Ni faras nian eblon elekti taŭgajn recenzantojn, kompetentajn pri la koncerna temo.” Do, tial mi publikigas mian replikon en la interreto. Esperanto-revuoj rajtas represi ĝin.

La fakto, ke la eldonkvanto de 200 printitaj ekzempleroj ankaŭ post jaroj ne elĉerpiĝis, indikas ne nur malrapidan vendadon de tia libro, sed signalas ankaŭ malgrandan intereson pri la temo.

Andreas Künzli

[www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)

15-12-2011 (kompletigita 2013-03 kaj 2020-06)

Deutsche Version s. unten

# Die Rache der Rezensenten oder der Fortschritt des Zynismus

Eine nachträgliche Replik eines kritisierten Buchautors

Es ist bekannt, dass die Esperanto-Bewegung sich ambivalent in Bezug auf das Judentum L.L. Zamenhofs und dessen homaranistisch beeinflussten Ideen verhielt. Das Spektrum dieser Haltung zu diesen Dingen erstreckte sich von sympathischer Akzeptanz über Gleichgültigkeit bis hin zu extremer Kritik und Ablehnung (so vertreten wie vor allem in gewissen Linkskreisen auf der Linie Drezen-Graetz-Blanke). Nun hat Zamenhof seinen Mitstreitern selbst empfohlen, dass sie sein Judentum nicht betonen sollten, denn dies könnte der Esperanto-Propaganda schaden. So versuchte man, und zwar nicht nur in Polen (das zu Lebzeiten Zamenhofs als Staat gar nicht existierte), *aus dem Juden Zamenhof quasi einen Nichtjuden zu machen*; man proklamierte ihn als „Polen“, obwohl Zamenhof diese polnische Identität selbst bestritten und strikt abgelehnt hatte. Er selbst bezeichnete sich als einen „russländischen Hebräer“ bzw. „russischen Juden“, als seine historische Heimat betrachtete er „Litauen“, weil seine Familie dem Zweig der litauischen Juden (Litwaken) entstammte. Aber diese komplizierte Stammeszugehörigkeit Zamenhofs hatten die Esperantisten nie begriffen; zweitens ignorierten sie sie, denn sie passte nicht zur Propaganda zugunsten des „polnischen“ Augenarztes u.ä. Dass er auf polnischer Erde lebte und arbeitete verstand sich von selbst. Man kann also schlussfolgern, dass das Judentum Zamenhofs offensichtlich ein gewisses Problem oder eine Peinlichkeit für die Esperanto-Bewegung darstellte und dass es sie, besonders gewisse linksgerichtete (= antizionistische?) Kreise in der UEA, nicht sonderlich interessierte – mit allen Folgen, die diese Haltung hatte. Dies war vor 1917 so, in der Zwischenkriegszeit und auch nach dem 2. Weltkrieg, sowohl im Westen wie im Osten. Auch nach 1989 schrieb man über das Judentum Zamenhofs in offiziellen Dokumenten nur ungern, und selbst in der Resolution des Esperanto-Weltkongresses in Bialystok von 2009 fand eine angemessene Würdigung des Judentums Zamenhofs nicht statt. Ich hatte dies seinerzeit bemängelt, da ich der Ansicht war, dass Zamenhof eine solche Ehrung des Judentums sicher verdient hätte, zumal er sich zu seiner wahren Identität immer ehrlich bekannte. Man kann sagen, dass ohne das Judentum Esperanto wahrscheinlich gar nicht existieren würde, aber eine solche Behauptung ist in der Esperanto-Bewegung schlicht unpopulär.

Das Ziel meiner Arbeit und des Buches ist also, die bisherigen Verdrehungen, Halbwahrheiten und Lügen umzustürzen und die Wahrheit über L.L. Zamenhof wiederherzustellen. Aber da die Mythen, Legenden und Überzeugungen über Zamenhof, die die Esperanto-Propagandisten produzierten, sich in der Esperanto-Bewegung im Laufe der 125 Jahre dermassen stark verwurzelt sind, ist zu befürchten, dass jeder Versuch, eine Revision der Geschichte anzustreben, eine vergebliche Bemühung, ja zum Scheitern verurteilt ist.

## Einige Bemerkungen, Präzisierungen und Berichtigungen zum Buch

Ob es nun gefällt oder nicht, beanspruche ich, die erste wissenschaftliche Zamenhof-Biographie in deutscher Sprache – und wahrscheinlich auch überhaupt – vorgelegt zu haben, die auf den jüdischen Kontext Zamenhofs fokussiert ist. Aber einige Rezensenten wollen dies anscheinend nicht anerkennen und begannen, mein Werk mit Skepsis zu betrachten oder sogar regelrecht zu zerzausen, so in der Zeitschrift des Esperanto-Weltbunds (UEA) und in der Revue *Language Problems and Language Planning (LPLP)*. Um den falschen Eindruck, der durch die einseitige Kritik entstanden ist, zu verhindern, sehe ich mich veranlasst, meine Gesichtspunkte zu rechtfertigen und einige Missverständnisse zu berichtigen. Die bare Abneigung einiger Rezensenten – vor allem deutscher Herkunft – gegenüber meiner Zamenhof-Biographie ist übrigens im Grunde nichts Neues und kann verschiedene Wurzeln haben: Irrationaler Hass auf Zamenhof, ideologisch-politisch-religiöse Motive, antisemitische Reflexe (oder zumindest Allergie und Abneigung gegenüber dem Jüdischen<sup>2</sup>), simple Arroganz, persönliche Frustration, blanker Neid oder Rachegefühle gegen den Buchautor wegen früher geäußelter Kritik, oder etwas anderes, denn genau diese Rezensenten konnten mit dem Judentum Zamenhofs nie etwas anfangen. Das Hauptproblem ist, dass diese „Historiker“ darauf abzielen, ihre unerschütterliche Deutungshoheit, also die „richtige“ und „wahre“ Interpretation in Sachen Zamenhof zu bewahren und zu monopolisieren.

---

<sup>2</sup> Wie dies v.a. in gewissen katholischen, lutherischen, atheistischen und Israel-kritischen Kreisen vorkommt.

Die Einführungskapitel und die Exkurse über die Geschichte Russlands, Polens, des Antisemitismus usw. wurden hinzugefügt, damit auch die Esperantisten, die das Buch lesen möchten, diese Themen kennenlernen können, um die Biographie Zamenhofs im historisch-politischen und jüdischen Kontext wahrzunehmen. Der Zweck dieser Kapitel besteht darin, anhand der spezifischen Züge der Geschichte der Polen, Russen und Juden aufzuzeigen, warum Zamenhof nicht als Pole (oder Russe) bezeichnet werden konnte, sondern weshalb er nur Jude sein konnte und in der Rezeption ausschliesslich als Jude wahrgenommen werden kann (und muss).

In meinem Buch werden auch die im Allgemeinen weniger bekannten Episoden mit Sokolov, Dambrauskas, Ostwald u.v.a.m. behandelt, und hinzugefügt wurde der Artikel von Josef Meisl. Dies wurde von den Rezensenten nicht honoriert. Die wichtigste Korrespondenz zwischen Zamenhof und den Esperantisten ist im Buch dem PVZ (Iudovikito) entnommen worden, alle Quellen und Zitate wurden im Text angegeben. Bei der ‚Fortsetzung‘ (Kap. 34) war es nicht das Ziel, über Olsvanger zu berichten, sondern an die während des Holocaust ermordeten Familienmitglieder Zamenhofs zu erinnern. In meinem Buch wurden zahlreiche jüdische Aktivisten erwähnt und gewürdigt, die den Anfang der Esperanto-Bewegung in Russland und Europa mitgestaltet haben. Kein einziges Wort haben die Rezensenten über diese Protagonisten verloren! Ausserdem habe ich die damalige Situation in Białystok im Einzelnen und die Atmosphäre im Hause Zamenhofs nach verfügbaren Aussagen von Zeitzeugen geschildert. Es wurde auch der Versuch gemacht, Zamenhofs Hillelismus in den Kontext der damaligen zionistischen Debatte zu rücken. Warum sollte ich auf die englisch-amerikanische Literatur über das Judentum und den Zionismus zurückgreifen? Die deutschsprachige reicht völlig aus und ist geeignet und wurde in ausreichendem Mass berücksichtigt. Das Buch verfolgte auch nicht das Ziel, sich in die judaistische Fachthematik zu vertiefen (bei einigen Judaisten hat der Buchtitel vielleicht übertriebene Erwartungen geweckt). Die Haltung Zamenhofs zum Zionismus ist allgemein bekannt und wurde im Buch noch einmal objektiv aufgearbeitet. Sie kann nun nicht mehr vermieden, verschwiegen, manipuliert, verspottet oder sogar verfälscht werden, wie dies in der Vergangenheit geschah. Im Unterschied zu anderen Rezensenten hat Lins, der weitgehend die Argumente Hauptenthal übernommen hat, immerhin bemerkt, dass der Hillelismus-Text von L.L. Zamenhof von 1901 nun auch in einer deutschen Übersetzung vorliegt (wenn auch nicht in perfekter Form, so dass er vielleicht etwas revidiert werden muss). Die Bibliographie ist die bisher umfangreichste, die je in einem Buch über Zamenhof erschienen ist, und sie widerspiegelt die Auswertung vieler bisher unberücksichtigter Artikel. Dass Lins und andere offenbar Abscheu und Langeweile für Bagatelle empfinden, bedeutet, dass ihre Argumentation sich erschöpft hat. Die zentrale Hypothese meines Buches, dass die Schaffung und Veröffentlichung des Esperanto im Grunde unmittelbar und direkt mit der ‚jüdischen Frage‘ bei Zamenhof im Russischen Reich zusammenhängt, wurde von den Rezensenten nicht kommentiert, obwohl sie sich dieser Tatsache sehr wohl bewusst sein dürften. Das Problem ist, dass sie sich zu ihr nicht bekennen und sie nicht anerkennen wollen!

Nicht einen einzigen positiven Punkt konnte Lins in meinem Buch entdecken, während andere Leser und Rezensenten, z.B. Tazio Carlevaro, Liu Haitao, Tomasz Chmielik, Walter Żelazny, Leif Nordenstorm, Fritz Wollenberg und andere das Buch weit positiver beurteilten. Agnieszka Jagodzińska (Uni Wrocław, *AJS Review* Cambridge) schrieb eine normale Rezension, die sich durch ihre Objektivität von anderen seltsamen Esperantisten-Reaktionen wohltuend unterscheidet. Shaul Stampfer von der Hebräischen Universität pries das Buch in *Religious Studies Review* als „sehr eindrückliche Studie“, als „zweifelloso wichtig“. (Und 2017 fand das Buch auch grosses Lob von Seiten von Liliana Ruth Feierstein, Professorin für Kulturwissenschaft in Berlin).

Der Herausgeber von Harrassowitz fand mein Manuskript interessant und hiess das Buch in der Jüdischen Serie als wichtigen Beitrag willkommen. Im Übrigen gilt bei den Buchverlagen das folgende Prinzip: Lieber ein Zerriss als tödliches Schweigen.

Ich kenne die Schwächen und Stärken meines Zamenhofs-Buches selbst und benötige keine Belehrungen derjenigen ‚Fachleute‘, die eine Allergie beim Thema Zamenhof verspüren und eigentlich nur beabsichtigten, dem Autor ans Bein zu pinkeln.

Zur Zusammenarbeit wäre noch zu sagen: Während der Niederschrift des Textes habe ich verschiedene Esperantisten und Interlinguisten in Deutschland angeschrieben, so den Deutschen Esperanto-Bund (Fischer), die Gesellschaft für Interlinguistik (Blanke) und auch Herrn Dr. Lins persönlich, ob sie bereit wären, meine Arbeit als Lektor, Korrektor oder Berater zu unterstützen. In allen Fällen erfolgte eine harsche Absage, meist mit der Begründung, man habe keine Zeit dafür u.ä.

So meine ich, dass mit meinem Buch insgesamt genügend Substanz vorliegt, mit der man sich mit dieser Materie befassen und bei der man sich die Zähne ausbeissen kann. Im Vergleich mit den banalen, belanglosen und irrelevanten Diskussionen, die während des Zamenhof-Jahres und überhaupt in der Esperanto-Bewegung geführt wurden, denke ich, dass mein Buch den stärksten Beitrag beisteuerte. Die leider zu vielen und unverzeihlichen Tippfehler, die jedoch weder den Sinn des Textes entstellen noch sein Verständnis beeinträchtigen, können in einer zweiten Auflage oder einer Neuauflage des Textes berichtigt werden (wofür es meinerseits allerdings bisher keine Pläne gibt). Der Verlag stellte leider kein Lektorat zur Verfügung und kontrollierte den Text auch nicht, so dass diese ärgerlichen Fehler zurückblieben, die der Autor erst nach dem Erscheinen des Buches bemerkte. Ein externes Lektorat hätte sich aber als sehr kostspielig erwiesen, weshalb darauf verzichtet wurde. Ich machte den Fehler, dass ich den mehrmals von mir durchgelesenen Text zu früh für den Druck einreichte. Ich hatte den Fehler teufel komplett unterschätzt, und die Fehler nahm ich erst nach Jahren, als ich den Text wieder einmal las. Der Herausgeber der Jüdischen Reihe von Harrassowitz, in der die Biographie erschien, winkte den Text durch, ohne kritische Bemerkungen zu machen. Irgendwie fiel ich mit diesem Projekt in die Falle der Unseriosität, Gleichgültigkeit und Überforderung – und der folgenden logischen Häme und des totalen Desinteresses.

Ausser des Abdrucks des von mir ins Esperanto übersetzten Katalogtextes (den ich dem vormaligen Redaktor sandte), hat das Bulletin des Deutschen Esperanto-Bundes, *Esperanto aktuell*, das Buch auch niemals vorgestellt. Es erwähnte es lediglich in Nr. 5/2011, S. 15, in der Bibliographie, und in einem Bericht von Utho Maier, S. 21, aus dem man erfährt, dass die Verantwortlichen der Esperanto-Bibliothek in Aalen offenbar „am Überlegen waren, ob wir das nicht gerade preiswerte Werk von Andreas Künzli nicht doch kaufen müssten“. Es stimmt, dass der Einzelverkaufspreis dieses Buches viel zu hoch ist. Aber zum Glück erhielten sie es „gerade noch rechtzeitig“ wie es scheint in dankenswerter Weise von dem grossen Mäzen Ulrich Lins, der es wohl ausgeliehen oder als kostenloses Rezensionsexemplar vom Verlag oder von der UEA erhalten hatte und es nach getaner Rezension-Arbeit nach Aalen weiterverschenkt haben dürfte. Im Übrigen hatte das erwähnte Bulletin niemals die Güte gehabt, diese meine Replik zu den erschienenen Rezensionen zu veröffentlichen, die im Internet veröffentlicht wurden. Ausserdem herrscht in Esperanto-Kreisen Deutschlands, Österreichs und der Schweiz totales Schweigen über das Buch, und der Verfasser erhielt auch nie eine Vortrags-Einladung von irgendeinem Esperanto-Klub in Deutschland, Österreich oder der Schweiz. Ich drängte mich auch keinem dieser Klubs auf. Ob es sich nur um Gleichgültigkeit handelt oder ob eventuell auch andere, ernsthaftere Gründe dahinterstecken? Oder ist das lange befürchtete Ende der Esperanto-Bewegung nun eingetreten, von der selbst ihre Buchautoren nichts mehr hören?

Der Herausgeber von *Language Problems and Language Planning (LPLP)* zeigte sich mit einer faulen Ausrede uninteressiert, meine Replik zu veröffentlichen. So vertreibe ich sie halt übers Internet. Die Presse kann sie gerne nachdrucken.

Die Tatsache, dass die Auflage von 200 gedruckten Exemplaren nach Jahren nicht ausverkauft ist, bezeugt einen langsamen Verkaufsprozess und signalisiert ein geringes Interesse für das Thema.

Andreas Künzli

[www.plansprachen.ch](http://www.plansprachen.ch)

15.12.2011 (ergänzt im März 2013 und im Juni 2020)